


Promenado en la centro



Urbo ĉe la Maro OSTENDE



Maldekstre estas la "North Sea Yacht Club", unu el la tri ostendaj jaĥthavenoj. La tipa subĉiela fiŝvendejo **Vistrap** (fiŝŝtuparo) ofertas freŝajn fiŝojn.

Oni nun preterpasas la **Akvarion** kun la vivantaj faŭno kaj flaŭro de la Norda maro.

Je la alia flanko de la baseno situas la moderna konstruaĵo de la ostenda pilota servo. Interne la flandra pentristo *Raveel* artisme pripentris la murojn.



Ĉe la fino de la kajo ni trapasas la kluzojn de la Mercatorjaĥthaveno. Tie troviĝas la stacio de la pramŝipoj Oostende-Ramsgate, Britio.

Dekstre oni vidas la belan St.-Petro kaj Paŭlopreĝejon, konstruita en 1907 en novgotika stilo. Apude staras la malnova St.-Petro-turo.

La trimastulo **Mercator** estis trejna ŝipo de la belga komerca ŝiparo. Ĝi

estas vizitinda muzeo. Por havi superrigardon de la belga moderna arto, vi nepre vizitu la **Muzeon de Moderna Arto** en Romestrato.

En la Leopoldparko la flora horloĝo ankaŭ montras la daton. Proksime troviĝas statuo de la artisto nomita "La Maro", sed la ostendanoj mokeme nomas ĝin "Dika Matilda".

De tie ni alvenas denove ĉe la maro, je la alia flanko de la kazino. Se vi estas laca, eksidu antaŭ unu el la multaj kafetarioj kaj restoracioj kun bela vido sur la maro kaj la plaĝo.

Poste vi daŭrigas la promenadon por alveni ĉe la **Veneciaj Galerioj**. Konstruita sur malnova duono situas la antaŭa Reĝa Vilao, nun 4-stela hotelo. Jam de longe la belgaj reĝoj ŝatas restadi en Oostende. La unua reĝino Louise-Marie mortis en nia urbo. Per la zorgoj de Leopold I oni instalas la unuan fervojan linion de Bruselo al Oostende kaj la pramservon al Dover, Britio. Leopold II estas je la bazo de pluraj grandaj konstruaĵoj en nia urbo, i.a. la jam menciita St. Petro kaj Paŭlopreĝejo, la Galerioj kaj la Terma Palaco (varmbanejo). Memorigas lin la rajda statuo super la tri volboj ĉe la komenco de la **Reĝaj Galerioj**. Ili estis finkonstruitaj en 1905 kaj, longaj je preskaŭ 400 m, kondukas al la **Wellington-Vetkurejo**.

La promenadon sur la mardigo vi povas daŭrigi ĝis Mariakerke, kie vi trovos la etan pitoreskan romanikan Dunpreĝejon. Sur la ĉirkaŭanta tombejo troviĝas la tombo de la fama ostenda pentristo *James Ensor*. Pli malproksime, en duna regiono, situas la *Bieno Raversijde* kun i.a. la eksa loĝloko de Princo Karolo, la frato de Leopold III kaj regento en la malfacilaj jaroj post la dua mondmilito. Sur la bieno

oni vizitas la subĉielan muzeon Atlantic Wall, "atlantika murego", germana strategia defendloko kontraŭ atakoj de el la maro.

Nun ni reiru al la centro de Oostende. Antaŭ retrovi la kazino, ni ne preterlasu admiri kelkajn belajn vilaojn de la pasinta jarcento, ekz. "**Vilao Maritza**". Ĉe la Kazino ni malsupren iras al la moderna Turisma Oficejo kaj al la komerca centro kun areo por piedirantoj. La **Wapenplein**, granda placo, allogas la turistojn per la kiosko, kie dum la somera sezono ĉiun tagon estas koncertoj. La diversaj kafejoj kaj restoracioj havas sidlokojn ĉirkaŭ la kiosko. En la vasta konstruaĵo je unu flanko de la placo trovas lokon Fest- kaj Kultursalonoj, la Urba Muzeo de Belaj Artoj, la Regiona Muzeo kaj la Urba Biblioteko.



Bonvenon en Oostende!



Urbo ĉe la Maro
OOSTENDE




La **kazino**, konstruita en 1953, estas la plej granda en Belgio kaj enhavas monludo-, ekspozicio-kaj kongresosalonojn, restoracion kaj aŭditorion kun 1600 sidlokoj. Estas planoj renovigi la konstruaĵon.

La larĝa **promenejo** kondukas al la Monumento memore al la Maristoj, poste al la Kajo de la Fiŝistoj. Maldekstre troviĝas la Geto, de kie vi povas rigardi la

en- kaj elnavigadon de fiŝistŝipoj, jaĥtoj, pramŝipoj, pasaĝer-katamaranoj kaj kargoŝipoj.

Laŭlonge de la **kajo** la malsatuloj povas elekti inter pli ol 40 restoracioj!



Maldekstre estas la "North Sea Yacht Club", unu el la tri ostendaj jaĥthavenoj. La tipa subĉiela fiŝvendejo **Vistrap** (fiŝstuparo) ofertas freŝajn fiŝojn.

Oni nun preterpasas la **Akvarion** kun la vivantaj faŭno kaj flaŭro de la Norda maro.

Je la alia flanko de la baseno situas la moderna konstruaĵo de la ostenda pilota servo. Interne la flandra pentristo **Raveel** artisme pripentris la murojn.



Ĉe la fino de la kajo ni trapasas la kluzojn de la Mercatorjaĥthaveno. Tie troviĝas la stacio de la pramŝipoj Oostende-Ramsgate, Britio.

Dekstre oni vidas la belan St.-Petro kaj Paŭlopreĝejon, konstruita en 1907 en novgotika stilo. Apude staras la malnova St.-Petroturo.

La **trimastulo Mercator** estis trejna ŝipo de la belga komerca ŝiparo. Ĝi

estas vizitinda muzeo. Por havi superrigardon de la belga moderna arto, vi nepre vizitu la **Muzeon de Moderna Arto** en Romestrato.

En la Leopoldparko la flora horloĝo ankaŭ montras la daton. Proksime troviĝas statuo de la artisto nomita "La Maro", sed la ostendanoj mokeme nomas ĝin "Dika Matilda".

De tie ni alvenas denove ĉe la maro, je la alia flanko de la kazino. Se vi estas laca, eksidu antaŭ unu el la multaj kafetarioj kaj restoracioj kun bela vido sur la maro kaj la plaĝo.

Poste vi daŭrigas la promenadon por alveni ĉe la **Veneciaj Galerioj**. Konstruita sur malnova duono situas la antaŭa Reĝa Vilao, nun 4-stela hotelo. Jam de longe la belgaj reĝoj ŝatas restadi en Oostende. La unua reĝino Louise-Marie mortis en nia urbo. Per la

zorgoj de Leopold I oni instalas la unuan fervojan linion de Bruselo al Oostende kaj la pramservon al Dover, Britio. Leopold II estas je la bazo de pluraj grandaj konstruaĵoj en nia urbo, i.a. la jam menciita St. Petro kaj Paŭlopreĝejo, la Galerioj kaj la Terma Palaco (varmbanejo). Memorigas lin la rajda statuo super la tri volboj ĉe la komenco de la **Reĝaj Galerioj**. Ili estis finkonstruitaj en 1905 kaj, longaj je preskaŭ 400 m, kondukas al la **Wellington-Vetkurejo**.

La promenadon sur la mardigo vi povas daŭrigi ĝis Mariakerke, kie vi trovos la etan pitoreskan romanikan Dunpreĝejon. Sur la ĉirkaŭanta tombejo troviĝas la tombo de la fama ostenda pentristo **James Ensor**. Pli malproksime, en duna regiono, situas la **Bieno Raversijde** kun i.a. la eksa loĝloko de Princo Karolo, la frato de Leopold III kaj regento en la malfacilaj jaroj post la dua mondmilito. Sur la bieno